

esperantouso

1996(1)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

In This Issue:

- Usona Esperantisto raportas al ni pri vizito al Kubo por ĉesti la kongreson de la Kuba Esperanto-Asocio
Mia Feria Vojaĝo 1
- En du-parta artikolo, Ĝan Ŭesli STARLING pri-skribas metodojn por reklami Esperanton.
Semu per Libroj 7
- Desurpugiĝu kaj Agu** 7
- Language Barriers to Third World Progress** 11
- 2a JES: Duono da partoprenantoj... duoblo da amuzo** 13
- 3a Amerika Kongreso** 14
- Kaj niaj regulaj rubrikoj
De la redaktoro 2
Newsbriefs 3
Raporto de USEJ 4
Regionaj Raportoj 5
Anoncoj 6
Volas Korespondi 6
Nekrologoj 6
Recenzoj 9
Language in the News 10

Mia Feria Vojaĝo

verkis Sennomulo

"Ridetu ĝardenisto se en la grundo vi pinĉas kaj serĉas la profundajn sekretojn de al aĝoj. Ne pensu ke rozoj malbeliĝas pro dornoj sed pensu ke dornoj beligas pro rozoj."

—Jose Angel Buesa, tradukis Miguel Angel Gonzalez

Ĉu vi, kiel mi, sopiras la varman, verdan lokon, kie la turkisa akvo tuŝas la blankan sablon sub la ŝanceliĝantaj palmarboj? Mi, kiu venas de la frosta regiono Minnesota, ja trovis tion, kaj ankaŭ malkovris la varman amikecon de la Kuba popolo.

Usonanoj ne scias multe pri Kubo, parte ĉar ili ne rajtas viziti ĝin. Tamen, ne estas malfacile viziti tiun belan, fascinan landon se vi iras tra alia lando kiel Meksikio aŭ Kanado. Tion mi faris por ĉesti la 2an kongreson de la Kuba Esperanto-Asocio en Marto 1996. Mi ne donas mian nomon al vi, ĉar mi ja estis en Kubo kontraŭleĝe.

Mi flugis al Havana tre facile el la urbo Cancun en Meksikio. Mi neniam sentis danĝeron ke Usonaj policanoj kaptus min. Oni diras ke multe da Usonanoj vizitas Kubon kontraŭleĝe. La organizo "Pastroj por Paco" eĉ reklamas ĝiajn ekskursojn al Kubo.

Ekde la komenco de mia vojaĝo mi ne devis zorgi pri io ajn ĉar mia kara plumamiko Miguel estis tie por zorgi pri mi. Sen lia helpo mia vizito al Kubo estus tre pli malfacila. Unue, li aranĝis por mi loĝlokon en privata domo, malpli kosta ol hotelo. Tiu estis kontraŭleĝe, kvankam tre ofte

farata. Do, mi ne nur kontraŭis Usonan leĝon per mia vojaĝo, sed ankaŭ Kuban leĝon!

Vi vere ne povos kredi kiel malfacila estas la vivo en Kubo nun. La kutima salajro estas \$15 monate, sed la prezoj por ĉio krom loĝado kaj manĝo estas samaj kiel ĉi tie. Mi vidis longan vicon da homoj. Kio estas tio, mi demandis. Estis homoj kiu atendas la buson por reveni hejmen. Ne estas sufiĉe da benzino por la busoj. La rubaĵoj restas ne-kovritaj sur la strato ĉar mankas ŝarĝaŭtojn por forporti ilin. Kubanoj estas fieraj kaj ne almozpetas, sed, ekzemple, iu maljunulo surstrate kantis por mi kaj poste petis monon por aĉeti sapon. Ĉiuj ankoraŭ rajtas ricevi senkoste la kuracadon, kaj la kuracistoj estas kapablaj, sed al ili mankas medikamentoj. Al Kubo mi portis mian malnovan komputilon kaj skribmaŝinon kiel donacojn. Por mi estis forĵetindaj antikvaĵoj, sed por la Kubanoj ili estis trezoroj.

La Usona registaro kontraŭas Kubon kaj ne permesas viziton aŭ komercon. Mi ne scias pri tiuj politikaj aferoj. Sed mi povas diri ke la Kubaj homoj al kiuj mi parolis ŝatas Castro kaj kulpigas la Usonan registaron pro iliaj malbonaj vivkondiĉoj. Do, ŝajnas ke la Usona blokado ne sukcesas, nur kreas suferon kaj kontraŭ-Usonan senton.

La kongreso estis tre bone aranĝita. Okazis diversaj interesaj kunsidoj, ekz. "Apliko de surmerkatakaj principoj al Eo en Kubo" kaj "Ronda tablo pri scienc-

Daŭrigo sur paĝo 8

De la redaktoro...

La nova redaktoro salutas vin

Dum mi pretigis mian ununa numeron de *EsperantoUSA*, mi relegis multajn malnovajn numerojn. Trafas min, kiel bone la novaĵletero ĉiam spegulis la membraron. Se mi faros bone kiel via nova redaktoro, tio daŭros.

Estas diversaj grupoj da legantoj. Tiu fakto influas ĉiujn aspekton de la novaĵletero. Inter niaj legantoj estas pli ol nur membroj. Eble estas malofte, ke nemembra persono trovas kaj eklegas nian novaĵleteron. Sed, kiam tio okazas, ni tre forte volas montri al tiu homo, ke:

- Ja estas lingvo-problemo
- Esperanto estas la solvo

Por tiu leganto ni devas prezenti sufiĉan kvanton de la enhavo en Esperanto, ke tuj trafas lin, ke multaj homoj ja uzas la lingvon por komuniki. Por tiu leganto ni enmetas iom da artikoloj pri la kosto kaj malfacileco de tradukado, pri malplimultaj lingvaj rajtoj, pri internacia uzado de Esperanto, ktp. Unu numero de la novaĵletero konvinku tiun leganton, ke estas vigla, tutmonda komunumo de Esperantistoj, kiu uzas la lingvon ĉiutage por solvi verajn problemojn.

Kompreneble, granda parto de ĉiu numero estas por la membroj. Por ili ni prezentas:

- anoncojn pri okazontaj agadoj kaj okazintaj agadoj
- raportojn pri la stato de la asocio
- raportojn pri la stato de la movado en Usono kaj tutmonde
- artikolojn pri la uzado de Esperanto kiel interlingvo
- artikolojn pri la lernado kaj instruado de Esperanto
- multtemajn artikolojn en Esperanto

Kopirajto

Dum pli ol cent jaroj, verkistoj ofte ne kopirajtigis siajn Esperantajn verkaĵojn: ili volis, ke la plej multaj homoj legu iliajn vortojn. Tamen, laŭ nuna internacia leĝo, manko de kopirajta avizo ne signifas mankon de kopirajto: ĉiu verkaĵo estas kopirajtita de la verkistoj aŭtomate. Tiu kopirajto daŭras almenaŭ kvindek jarojn, kaj ofte pli longe. Do, malsame ol antaŭe, oni povas ekscii ĉu ni rajtas uzi verkaĵon nur per peto al la verkisto.

Nia novaĵletero ne senpermesese enhavas kopirajtitajn verkaĵojn. Sed, tio ne signifas, ke ni ne povas lerni de tia verkaĵo, kaj tio ne signifas, ke ni ne povas enmeti tion, kion ni lernas, aŭ per malgranda citaĵo aŭ per nova artikolo. Estas nur unu speco de verkaĵo, kiun ni tute ne povas uzi: tia, kiu estas valora nur se uzita entute (amuza desegnaĵo, ekzemple).

Ni ne kopirajtigas *EsperantoUSA-on*, por ke iu ajn povu uzi niajn vortojn. Sed, se verkisto petas, ni ja enmetos kopirajt-avizon por ties artikolo.

lom pri mi

Esperantistoj ofte diris "Mi esperantistiĝis je" iu specifa dato. Mi ne povas fari same. Mi esperantistiĝis malrapide, komencante eble dum 1987, sed ĉeestante mian unuan Esperantan kunvenon en 1994.

Lingvoj ĉiam interesis min. Mi studis kaj la francan kaj la germanan, sed kion mi lernis, estis, ke mi havas nenian lerton por lingvoj. Do, mi venis al Esperanto serĉante lingvon, kiun mi povas lerni.

Mi laboras por la firmo Motorola kaj loĝas en Champaign, Illinois.

Mi dankas la multajn personojn kiuj helpis krei tiun numeron.

Philip Brewer, provizora redaktoro

Address for information on the organization, memberships and the international language Esperanto:

Esperanto League for North

America

PO Box 1129

El Cerrito, CA 94530

Telephone: (510) 653-0998

For info (800) 8285944

Fax: (510) 653-1468

e-mail: elna@netcom.com

Address for editorial submissions, letters to the editor, *volas korespondi*, and anoncoj:

Philip Brewer, proviza redaktoro

EsperantoUSA

118 Kenwood Rd #354

Champaign, IL 61821

Telephone (217) 355-0714

e-mail: pbrewer@prairienet.org

Address for submissions for **Newsbriefs**

or

Language in the News

Mark Lambert, contributing editor

3501 University Ave.

Des Moines, IA 50311

e-mail: 2080361@mcimail.com

The editor gratefully acknowledges Peter Hull who created the Esperanto-specific characters in the fonts used in *EsperantoUSA*.

Newsbriefs

Esperanto in the Media—Mark Lambert, contributing editor

In a recent episode of the Fox network's Saturday morning superhero-spoof cartoon *The Tick*, the title character is kidnapped by aliens whose language consists of only one word: "What?" Eventually, one of the aliens addresses the Tick in English. After the Tick voices his surprise that the aliens speak English, the alien replies, "I'm the mission interpreter. I've trained myself in all of Earth's languages. Well, except Esperanto—we could see that one was going nowhere fast!" (Seen by Mark Lambert).

A *New York Times* columnist, criticizing Calvin Klein for the company's response to public outcry over Klein ads featuring young models in provocative poses, stated that Calvin Klein "babbled on in phrases seemingly translated from English to Esperanto and back again." (*New York Times*, p. D1, Dec. 29, 1995).

The *Washington Post* reported on a doctoral student in classical literature in Italy who recently wrote a book creating Latin terms for modern items such as stereos, fax machines, and computer viruses. After listing the several languages spoken by the student, the article mentions that he "is preparing a manual on Esperanto, an amalgam of languages fused into a single tongue." (Article reprinted in the *Los Angeles Times*, p. E2, Jan. 4, 1996).

Public Radio's Dr. Science recently read a letter from a listener who complained that listening to the Dr. Science program over the last few years had wasted a lot of the listener's time. Dr. Science responded with a list of ways the listener could have spent the time

more constructively, including "learning Esperanto." (Heard by Mark Lambert).

Theresa Makin, a Notre Dame High School student, was the subject of a feature article in the *Allentown Morning Call* newspaper. The article told of colleges' heavy recruitment of Theresa, because of her astronomical academic achievements. The article mentions a plethora of extra-curricular activities that Theresa has been involved in, including "director of external relations for the American Esperanto Youth Organization." (*The Morning Call*, p. N4, Jan. 11, 1996).

Noted author Umberto Eco's new non-fiction book, *The Search for the Perfect Language*, was reviewed in the *St. Louis Post-Dispatch*. Reviewer Robert Boyd noted that Eco's book examines Esperanto as a possible solution to the international language problem. (*St. Louis Post-Dispatch*, p. 5B, Jan. 21, 1996).

In a discussion of various kinds of networks, *San Francisco Chronicle* business columnist Jonathan Marshall argues that the ultimate "network" in the U.S. is the English language: "It may not be as pretty as French or as logical as Esperanto, but you'd better know how to speak it as long as everyone else does." (*San Francisco Chronicle*, p. B1, Jan. 22, 1996).

The *Village Voice* wonders if computer jargon might not become "a new trade language -- an Esperanto of the elite." (*Village Voice*, p. 27, Feb. 6, 1996).

Seeking submissions from readers describing their first-job

experiences, *The New York Times* gives examples: "that strange stint for a fruit-basket company...that summer selling shoes..." and "the year after college, when you opened mail for the Esperanto Society and worked on that (still undone) novel." (*New York Times*, p.11, Feb. 11, 1996).

According to Mike Barnicle: "When Pope Paul VI was elected, my uncle told me he voted twice," Father Francis recalled with huge delight. "He told me he was sitting next to a Cardinal from Uruguay who spoke no English and had no idea what was going and all he could say was, 'Who? Who? Who?' So Cushing took his ballot and wrote down 'Montini' and passed them both in.

"When he got back to Boston, he told me the story. He said to me, 'Kid, I voted twice. It was just like being back in Southie.' Boy, is that Irish or what?"

Sent in by David Wolff with the comment "Surely the Cardinals would have been using Latin?" (*Boston Globe*, March 17, 1996)

The items in this column were collected by Newsbriefs columnist Mark Lambert. It's impossible for me to see, hear, or read every mention of Esperanto in the media, so I need your help. I encourage ELNA members to submit to this column any mentions of Esperanto on TV, radio, magazines, and newspapers. We will credit the submitter. Send clippings or a paragraph about Esperanto in the media to the ELNA CO or to

Mark Lambert, 3501 University Ave., Des Moines, IA 50311-2305
e-mail: 2080361@mcimail.com
Thanks!

Raporto de USEJ

Raporto Printempa de la Usona Esperantista Junularo

Verkis
Daniel A. CUTHBERT,
Prezidanto de USEJ

Ekde la lasta Estrara Kunsido de USEJ en New York City en julio 1995 la organizaĵo vidis grandan sukceson sur ĉiuj flankoj. En lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj aferoj USEJ plifortiĝas. Samtempe la estraro glatigas la administrajn funkciojn de la organizaĵo.

Por disvastigi la celojn de USEJ, ni bezonas reton de lokaj grupoj tra la lando. Por atingi tiun celon la estrarano de Lokaj Aferoj, Guy Menaĥem, sendorme laboras. Li mem komencis instrui Esperanton en multaj bazlernejoj en Sudflorido. Samtempe li verkas libron titolitan *Kiel Establi Lokan Grupon*. USEJ intencas, ke eventuale ĉiuj junuloj kiuj interesiĝas en Esperanto—kaj volus establi grupon en siaj regionoj—povus sekvi la planon kiun Sinjoro Menaĥem klare priskribos. Menaĥem estas la ĝusta persono por tiu projekto: li sole establis la Floridan Esperanto-Ligon, en kiu membriĝis ĉirkaŭ kvardek homoj, kaj pli da lernantoj—per siaj klasgrupoj.

Aliaj junaj agadoj okazas en aliaj partoj de la lando. En Guilford, Connecticut, Steĉjo Blackstone diligente laboras kun la Gjilforda Esperanta Klubo (la GEKO). GEKO nun laboras en kaj la gimnazio kaj la mezlernejo. Tiamaniere la gimnazia grupo povas havigi pli altnivelajn kunvenojn.

En Baltimore, Maryland. Daniel Cuthbert kaj Jozef Truong kune establis EsperantoCafe. Tiu grupo estas konversacia rondo inter la studentoj de Johns Hopkins

University kaj Loyola College—sed ĉiuj estas bonevenaj. La grupo kunvenas en loka kafejo kaj la reklamoj uzas la moton “Babel and Baklava.”

Je la nacia nivelo, USEJ disvastigas informojn per du fontoj: la Gazeto kaj la Interreto. *KTP!*, la oficialan organon de USEJ redaktatan de Jozef Truong ricevas ĉiuj USEJ-membroj. *KTP!* estas kaj informilo kaj indaĵgazeto. Per ĝi membroj povas lerni pri la projektoj de USEJ, internaciaj junularaj aferoj, kaj aliaj esperantistaĵoj. Sed *KTP!* ankaŭ havas artikolojn pri subjektoj kiuj interesas ĉiujn junulojn: muziko, vojaĝado, sporto kaj aliaj aferoj junulaj.

USEJ havas agadon ankaŭ sur la Interreto. Per la USEJa loko sur la World Wide Web (WWW, aŭ TTT por TutTera Tekstaĵo) (<http://www.webcom.com/~usej>) ni ne nur povas informi membrojn, ni ankaŭ reklamas Esperanton kaj USEJ al la tuta mondo surlinia. La Paĝmastro, Sybil Harlow, kreis la retlokon, kaj helpas ŝin Jed Meltzer, la Estrarano de Eksteraj Rilatoj. USEJ uzas interreton kiel internan komunikilon. Ĉar la estraro estas disĵetita tra Usono, retroŝtaĵo faciligas nian komunikadon. Ekde 1^a aŭtuno de 1996 ĉiuj estraranoj estos surlinie.

Internacie USEJ havas kontaktojn kun multaj aliaj junulargrupoj esperantistaj. Ricevis USEJ dankmesaĝon de Malagasio kaj de la Universala Kultura Servo. Dank’ al Theresa Makin, la Estrarano de Internaciaj Aferoj, USEJ kaj ĝia brita ekvivalento, JEB, kune eldonos gazeton. Kaj per la helpego de Briano Kreuger, informo pri Esperanto nun disvastiĝas en Meksikio. USEJ ankaŭ havas kontakton kun la kanada kaj kebekia junularoj.

Sed USEJ ne nur funkcias kiel informcentro. Multaj regionaj kongresetoj okazis kaj okazos en

1995/96. Specife, en marto okazis la 2a Junulara Esperantista Semajnfino (JES 96) en Philadelphia, Pennsylvania. Ĉeestis homoj de pli ol ok ŝtatoj (unu el Washington State!). Kune la partoprenantoj ĝuis bonbonan semajnfino en la pacplena monaĥinejo Mother Boniface. Diskutoj, dancoj, klaĉoj kaj sportoj estis nur parto de la JES-programo.


En aŭgusto okazos du aliaj kongresoj, en Florida Ŝtato, FEL okazigos sian propran kongreston, kaj en New York okazos la Nord-Amerika Junulara Tendumado (NAJT), kiu estas internacia semajnfino inter la usonaj, kanadaj kaj kebekiaj junularoj. Partoprenantoj intencas amuzi sin en bela tendumadejo apud Pottersville, New York. Ĉar ĝi estos ŝanco por la kanadanoj kaj usonanoj kunveni, ni intencas ankaŭ diskuti metodojn por plifortigi la agadojn de la du naciaj grupoj. Daniel Cuthbert estas la usona kontaktpersono por NAJT kaj Briano Kreuger kreis por la kunveno belan TTT-paĝon, kiu atingeblas ĉe:

<http://192.211.16.13/individuals/kuniklon/NAJT/inform.html>

USEJ kreskas kaj ĝiaj servoj pliboniĝas dum la organizaĵo plifortiĝas. USEJ daŭrigas sian neoficialan moton: Dediĉita al la Subteno de Transkultura kaj Mondskala Komprenado inter Usonaj Junuloj per Esperanto.

Mi volus, ke tiu paĝo restu loko por komunikadi al la pli granda Esperantistaro en Usono pri la agado de la juna fako. Mi intencas skribi raporton por ĉiu numero de EsperantoUSA—sed ne ĉiam tiel longe aŭ formale! Mi volonte aŭdus de homoj kun ideoj, sugestoj, ktp.

Daniel Cuthbert
3215 North Charles St, Apt# 1010
Baltimore, MD 21218
Tel: (410) 467-1371
Net: <daniel@jhu.edu>



Regionaj Raportoj



Alaska George Partlow skribas, "ESA elspezis \$50 al la eldonejo Random House por certigi

la rajton de Kroata Esperanto-Ligo publikigi mian tradukon (kunlabore kun Bill MAXEY) de la poemo kiun Maya Angelou laŭtlegis ĉe la festo en San Francisko okaze de la 50a datreveno de UN... kiu aperis en la januara numero de *Tempo*, la revuo de la Kroata E-Ligo."



California En SFERILLO Ellen M. Eddy raportas la 31-an Tut-kalifornian Konferecon kiel "Granda Sukceso." Ĉirkaŭ 50 Esperantistoj ĉeestis. Ili ĝuis

prezentadojn pri "Perkomputila Tradukado" de Myron Bondelid, "Enreta Esperantujo" de Orlando Raola, kaj "Esperanto en la Hejmo" de Irina kaj Alex Shlyafar. Charlie Galvin festparolis. Per aŭkcio, ili pliriĉigis la fonduson por la Esperanto-kursaro je \$349.



Illinois La kabla TV sistemo en Chicago invitas la partoprenon de senprofitaj grupoj je kanaloj 19, 21, 27 kaj 42. La Esperanto Socio de Chicago faras multe per tiu

invito:

THE WORLD OF ESPERANTO (Steve Allen/Wm. Harmon) aperis je kanalo 19.

Je kanalo 21 sur la ekrano aperas 2 societanoj, kiuj respondas telefonvokojn dum 13 lundoj ekde

la 1a de aprilo, 5-5:30 pm.

Dum marto aperis je kanalo 27, 2 1/2 minuta prezentaĵo kiu celas ke la publiko petu ke elementaj lernejoj instruu Esp. Estis 33 informpetoj ĝis la 18a de marto.

Je kanalo 42 estas ripeta anonco pri la senpaga poŝta kurso havebla per tel. (800) 828-5944. (35 jam petis la informon dum la unuaj 9 tagoj.)


Ili ankaŭ raportas ke UEA prezidanto LEE Chong-Yeong vizitis la urbon la 18an de januaro.



Michigan Ĉina aferisto vizitante Miŝiganon montris fotografiajn de si kaj sia familio al du Miŝiganaj

aferistoj. Unu el tiuj, Steve Walker, rimarkante ke en la foto la Ĉino surhavas T-ĉemizon kun bildo de koro kaj la vortoj "Mi amas Esperanton," diris "Mi konas Esperantiston Sherry Wells." Per tio, tagmanĝon kun multaj lokaj Esperantistoj aranĝis.

Sherry Wells will be teaching a week-long Esperanto class for beginners the week of July 8. For information call her at (810) 543-5297



Nebraska Members of the Nebraska Internaci-lingva Asocio

(N.I.A.) and Prairie Peace Park volunteers installed a gazebo at the Park on April 20th, 1996 as a memorial to the founder of the Esperanto language, Dr. L.L. Zamenhof. This was a day the group had long awaited, reports June Fritz, N.I.A.'s Secretary. They

began making plans for an Esperanto display at the Park over three years ago. Funds had to be raised to purchase the gazebo.

Donations came in from California, Georgia, Iowa, North Carolina, and Texas along with those from Nebraska Esperantists and friends. Eventually the gazebo will be used to promote Esperanto as a language to be taught in schools in the United States, Fritz says. Beside it will be a permanent plaque with information about Dr. Zamenhof. The gazebo is also designed to provide shade for parents who have children playing in the Park's giant sand pile nearby.



New York La 14-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado okazis 3-an de majo ĉe 777 UN Plaza pri "Languages and Global Education."

New England The New England Esperanto Society was to meet May 18th to discuss and decide on the future of ESNE. The front page of their publication, *Verda Lumo*, featured an dramatic plea for two volunteers to step forward and take the positions of Prezidanto and Redaktoro.

Washington DC La *potomaka Esperantisto* reported that the Esperanto-inspired symphony, *Spiritstatoj* by David GAINES would be performed by the Peabody Woodwind Ensemble on April 17. They also issued a call for any material that should go in the Esperanto Society of Washing's archives.

Anoncoj

Position available

Bruno Dalla Pozza writes to the Central Office that he is in a position to hire an Esperanto speaking music teacher to assist him in the music department at the Northern Marianas Community College on the Island of Saipan. The person must be an American, who plays woodwind or stringed instruments.

Persons interested should contact him directly:
Bruno Dalla Pozza

Box 607, CK
Saipan MP 96950
Fax: (670) 233-6162

Por la revizio de PIV, ni petas la legantojn de nia gazeto, ke ili sendu siajn rimarkojn pri la jena temo: Ĉu la nomoj de urboj, regionoj, gentoj kaj similaj informoj, menciitaj en PIV kaj rilatantaj al via kutima loĝloko, ŝajnas al vi ĝustaj? Se ne, bonvolu sciigi viajn argumentojn kaj proponojn al:

Michel Duc Goninaz,

Val St-Geoges,
Chemin de l'Echelle,
FR-13100
AIX-EN-PROVENCE
Francio.

Charles M. Hall vojaĝos kun grupo el Utah-o al Istanbul, Turkio dum junio 1996 por partopreni en granda konferenco "HABITAT II". (Li estos la sola Esperantisto en la grupo.) Li volas kontakti iujn aliajn Esperantistojn, kiuj planas aŭ planus ĉeesti.

4874 S. 1710 E
Salt Lake City, UT 84117

Volas Korespondi

Fabio Brandt de Souza, Rua João Lucio Marques, 90 Hipica, BR-91755110 Porto Alegre/RS, Brazilo serĉas amikojn aŭ amikinojn por korespondi per interkomputila reto aŭ per ordinaraj leteroj. Mi estas brazilano, havas 26 jarojn, studas farmacion kaj ŝatas ricevi leterojn, poŝtkartojn sed ankaŭ paroli pri muziko, ekologio, popoloj k.t.p. Mi senpacience

atendas viajn leterojn. Ricevu grandan ĉirkaŭpremon de via brazila amiko.

SHEN Chengru, Academia Sinica, 52 Sanlihe Rd., CN-100864 Beijing, Ĉinio volas interŝanĝi poŝtkartojn.

Luiz DUARTE, C.P. 163, BR-20001-970 Rio de Janeiro, Brazilo

32-jara oficisto deziras korespondi kun gesamlingvanoj.

Alexis NGUMOYA I, P.O. Box 175, Dowa, Malawi, 26-jara rifuĝinto el Zairio ŝatus korespondi kun usonaj esperantistoj.

Nekrologoj

Ellen Eddy, kontribuanta redaktoro

Donna Slusher

Naskita en Everett, Washington la 7an de aŭgusto 1924; mortis la 18an de novembro 1995. Donna Slusher estis dumviva membro de ELNA kaj 25jara delegito pri mineralogio por UEA. Donna estris la loĝigan servon de la 1972 Universala Kongreso en Portland, Oregon. Ŝi estis la kasistino de ESPO (la Esperanto-Societo de Portland, Oregon) dum multaj jaroj kaj ankaŭ prizorgis heredaĵon kiun ESPO ricevis de Nellie Jane Campbell. Antaŭ kelkaj jaroj ESPO

transdonis tiun monon al ELNA.

Donna estis fidela subtenanto de ESPO, ELNA, kaj UEA. Ni ĉiuj sentas la mankon de ŝi. Ni sendas elkorajn kondolencojn al ŝiaj edzo John ("Doc") kaj filino Linda.

—el informo de Anne Whitteker, Portland

Gladys Nelson—Duono de paro de longtempaj Esperantistoj. Gladys Nelson 1909–1996 Campbell Nelson 1909–1982

Gladys kaj Campbell Nelson

estis paro de longtempaj esperantistoj kiuj bonvenigis la lokan Esperanto-grupon en sian hejmon en Covina, Kalifornio. Dum tiu tempo ili partoprenis en multaj Universalaj Kongresoj. Hejme la muzikaj talentoj de Campbell ofte montriĝis dum Zamenhofaj festoj. Campbell mortis en 1982 sed Gladys daŭre bonvenigis la grupon en sian hejmon. Krom sia intereso en Esperanto, Gladys instruis pian-kaj orgen-ludadon kaj ankaŭ ludis la

Daŭrigo sur paĝo 8

Semu Per Libroj

verkis Ĝan Ŭesli STARLING

Preskaŭ ĉiun someron mia familio ferias per tenda ruldomo ĉe malsama malproksima loko. Ni kutime rul-tendumas tie dum unu semajno, ĝuante la distraĵojn kaj la ŝanĝiĝon de cirkonstancoj. Sed malgraŭ la diverseco inter tiaj lokoj, mi trovis ke ĉiuj havas almenaŭ unu komunan samecon. Ĉiu tenduma kampo estas ne tro malproksime de almenaŭ unu urb(et)o, ĉiuj tiaj urb(et)oj havas bibliotekon, kaj en ĉiuj tiaj bibliotekoj libroj pri la lernado de nia kara lingvo tute mankas.

Pro tio, dum la lastaj du someroj mi kunportis ekzemplerojn de *Step by Step in Esperanto* verkita de Butler por transdoni al bibliotekoj. Unue mi serĉas la bretojn, trovante ĉiam ke la manko

ja estas tuta. Post tio mi serĉas la bibliotekist(in)on por informi pri la tuteco de tiu manko kaj oferti solvi la problemeton per senpaga donaco. Mi same faras rilate al informolibroj pri certa alia intereso mia. Neniam oni rifuzis tiujn donacojn. Unu eĉ ĝojis ricevi ilin.

Tiujn ĉi ekzemplerojn mi mem aĉetis de ELNA per la propra mono kontraŭ sufiĉe malgranda prezo. Po dek ekzempleroj mi pagis nur kvindek dolarojn (nun kvindekkvin—Red.). Mi agnoskas ke tio ne estas nepripensinda sumo. Sed se oni dividus ĝin per nur du bibliotekoj jare -- la kosto estus nur dek dolaroj jare kaj la kvanto sufiĉus por subteni tian donacadon dum du jaroj kaj duono.

Krome, dum mi estas tie, mi

ankaŭ ofte kaŝas etajn notojn reklamajn pri Esperanto en la lernolibroj kaj vortarojn de la naciaj lingvoj. Tiuj ĉi notoj diras, "Post vi fiaske malsukcesos studi tiun ĉi malfacilan lingvon, eble vi ŝatos esplori pri Esperanto, prunteprenu..." Mi kaŝas ilin ie ĉirkaŭ la komencaj paĝoj, por esti certa ke homoj ja trovos ilin. Preskaŭ certas ke la plejparto de ties studentoj ne legos ĝis la mezaj aŭ finaj paĝoj. Tio gvidos homojn al la nove donacita libro. Iom spioneca konduto, sed certe ne krimo. Kion vi pensas, se nur dek procento el la membraro de ELNA farus same, kiom multe kreskus la movado en Usono post nur kvin aŭ dek jaroj? Farinde, ĉu ne?

Desurpugiĝu kaj Agu!

verkis Bill MAXEY

Ĉe mi ekstere malavare printempas kaj interne palpeble sentiĝas ke ĉi jaro, 1996, alportas al ni, usonaj E-istoj, periodon de gravaj ŝanĝoj. Certe, la longe sopirata reapero de *EsperantoUSA* signos ĉe multaj el ni kvazaŭ renaskiĝon de ELNA. Kaj post kelkaj monatoj posteniĝos novaj gvidantoj de tiu asocio. Dum la marta Junulara E-ista Semajnfino en Filadelfio elkoviĝis multaj freŝaj ideoj pri E-agado. Oni lastatempe anoncis atenton al "ĉiutaga, internacia uzo de E-o" per komunikada pint-teknologio kadre de la ĉi-jara E-kursaro ĉe SFŜU. Krome, la Tria Amerika Kongreso de E-o, februare okazinta en Kostariko, estigis novan intereson koncerne rilatojn inter E-komunumoj ĉie en Ameriko, precipe inter nordo kaj sudo. Ĉio

ŝajnas bonaŭgura.

Aliflanke ni konfesu ke post pli ol 90 jaroj de organizita E-agado en Usono—la plej riĉa, plej helpema lando sur la terĝlobo, mondfama pro imagpovo, reklamado, teknologio kaj realigo de revoj—la nuna stato de ties E-komunumo ne spegulas tiujn avantaĝojn. Multloke nia afero stagnas, sencelas, disiĝas, eĉ vivluktas. Lastatempe vizitante samideanojn en kelkaj landpartoj, mi ĉie trovis homojn kiuj senhonte asertas daŭran kredon al la E-idealo kaj ties valoro, sed kiuj malgraŭ tio malaktiviĝis. Ĉe ili post la eklernado de la lingvo, la "irenda vojo" kvazaŭ malaperis: troviĝis nek daŭrigaj kursoj, nek sufiĉa kuraĝigo, nek proksimaj E-istoj, nek okazoj uzi la lingvon. Ili ja estas afablaj kaj bonkoraj—eĉ bonvolaj—homoj, sed sentas sin iel trompitaj kaj elrevigitaj

el la afero. Kaj inter bonaj, longtempaj E-istoj mi trovis tiajn, kiuj plene kapablas diversmaniere helpi al aliuloj, sed ege frustriĝas pro manko de taŭgaj okazoj fari tion. E-kluboj ne allogas al kunvenoj eĉ la plimulton de siaj propraj membroj. Kaj eble plej maltrankvilige, pli ol unu vera klerulo pri la lingvo nuntempe nur minimume aktivus. Ŝajnas ke E-o ne plu gravas por ili. Tiuj konstatoj multe pensigis min pri kiel ni povus konstrui veran, viglan E-komunumon kiu samtempe plenumos la bezonojn de ĉiuj siaj membroj kaj bone realigos la idealojn de E-o mem. Tiucele mi nun ellaboras kelkajn ideojn kiujn mi intencas publikigi post nur iomete da tempo.

Daŭrigo sur paĝo 8

Nekrologoj, daŭrigo de paĝo 6

orgenon ĉe multaj preĝejoj en Ontario kaj Corona. Ŝi estis longtempa amikino de Esperanto kaj fidela membro de ELNA. Antaŭ sia morto la 5an de februaro, ŝi petis ke amikoj donacu al ELNA anstataŭ sendu florojn al ŝia funebro. Ni sendas sincerajn kondolencojn al la gefiloj kaj parencoj.

—el informo de Paula Taylor, Ontario

Dr. Leonard Ellis Blickenstaff 1913–1995

Suda Kalifornio perdis alian longtempan Esperantiston kiam mortis D-ro Blickenstaff de La Verne en novembro 1995. Li pasigis la plej longan parton de sia vivo en Hindujo kie li estis administranto, kuracisto, kaj kirurgo ĉe malsanulejoj en Bulsar kaj Dahanu. Post sia reveno al Usono en 1970, D-ro Blickenstaff, lerta pianisto, instruis pianludadon private kaj dum 11 jaroj ĉe la Universitato de La Verne. Dum tiu tempo li eklernis Esperanton (aldone al ses jam lernitaj lingvoj) kaj verkis rakontojn kaj artikolojn en la lingvo. Ni sendas sincerajn kondolencojn al liaj edzino Elizabeth (Betty), gefiloj, kaj parencoj.

—el informo de Paula Taylor, Ontario

D-ro James Gordan (Jim) Bennett

Forpasis el la usona esperantistaro D-ro Bennett de Honolulu la 9an de decembro, 1995, kvin tagojn antaŭ la 80-jara datreveno.

Jim aliris Esperanton diversfoje en la vivo. Dum la fruaj 90aj jaroj li finfine sukcese kompletigis la

Poŝtan Kurson. En 1992 li partoprenis la Kursaron en SFŜU.

Deveninte de Mizurio (la ŝtato "Montru-do-al-mi"), li alprenis sintenon de skeptika humanismo. Kuracisto-patologo laŭ profesio, li kunigis la sciencan kaj la idealismon. Oni ja devis elmontri al li, ke afero aŭ ideo havas bazon en la realo kaj praktiko. Tiusintene li akceptis Esperanton. (Inter liaj aliaj interesoj: basbalo, skermado, maratonado, simfoniaj koncertoj.)

Li fariĝis fonda membro de Esperanta Stud-Grupo de Honolulu en 1993 kaj daŭrigis la strebojn al perfektigo en la lingvo. En septembro de 1995 li sciigis, ke lia vivo baldaŭ kurtiĝos pro unu el tiuj timigaj malsanoj, kiujn li pritraktadis en la vivlaboro.

Jim ĉiam kuraĝigis la novajn lernantojn de la lingvo—senkonsidere al ties aĝoj. Honore al li, ESSF starigis specialan stipendian fonduson en lia nomo.

—el la ESSF Bulteno (Esperanto-Studintoj de San-Francisko), la 15an de aprilo, 1996

Agul!, daŭrigo de paĝo 7

Tamen, por ke tia plano eĉ meze sukcesu, necesos ke ĉiu usona E-isto—eklernantoj, novbakitoj, plispertuloj, gvidantoj—redediĉu sin al nia afero kaj rezulte de tio ĵuru donaci dum la venontaj monatoj iom pli da tempo, da atento, da pensado (kaj laŭeble eĉ da mono) al ties bonfarto. Tute eblas, miaopinie, ke ĉiu E- komunumano povos kaj plene kontentiĝi kaj bone kontribui al la afero. Sen ia ajn dubo ĉiu usona E-isto povos trovi sufiĉe valoran rolon. Tiurilate mia nuna

peto estas ke v i m e m zorge pensadu pri la graveco de E-o al la mondo kaj al via vivo, memorigu al vi pri viaj motivoj eklerni ĝin kaj pri via jama investo en ĝi. Poste pretigu vin akcepti iom pli da respondeco pri ĝia eventuala sorto. Sen tia bonvolo daŭre lamos la E-agado nialanda. Tamen, ne ekzistas alia elekto. La situacio postulas ke *ĉiu el ni*—unuope kaj kunlabore—pli laboru kaj malpli esperu. Survoje ni nepre rekonu la multajn vere laŭdindajn atingojn de la usona E-istaro dum multe da jaroj. Ni kore ŝuldas multon al multaj. La venonta niavica kunlaboro omaĝu ilin per certigo ke tiu fundamento konstruita de ili ne baldaŭ disfalos. Mi antaŭvidas grandan antaŭenpaŝon en nia usona E-vivo kaj antaŭĝuas—ĝuste pro via bonvolo—gradon de kunlaboro neniam antaŭe okazintan inter ni. Ja ĉe mi malavare printempas.

Vojaĝo, daŭrigo de paĝo 1

teknika agado" kaj "Praktika leciono pri tradukado". La lingva nivelo de la partoprenantoj estis tre alta, kvankam la tre rapida kuba parolmaniero estis iom malfacile komprenebla. Ĉeestis kelkcent kubanoj kaj 14 eksterlandanoj, inkluzive 1 usonanon (mi!). Esperanto unue eniris Kubon en 1904 kaj la movado ankoraŭ estas forta.

Spite la vivkondiĉojn, la homoj estis viglaj kaj optimismaj. Ĉe la Esperanta kabareto ni dancis ĝis frumatene. Mi esperas ke ankaŭ vi povos sperti la amikecon de la kubanoj. La 3a kongreso de K.E.A. estos en 1999. Notu tion sur via kalendaro!

Recenzoj

Ĉefo Seattle: **Fratoj eble ni estas...** Trans. Philippe Chavignon. Illustrations by Philip Rivière. Bats: Éditions d'Utovie, 1993. 32p. ISBN 2-86819-510-5. Ĉe ELNA: kodo F R A 0 0 1 , p r e z o j \$8.30(nemembroj)/\$7.90(ELNA-membroj)

Recenzis Miko SLOPER

It is unfortunately necessary to invoke the distinction between form and content in the context of this little book. The good news is that the content is excellent; you can guess the bad news.

This famous speech of Chief Seattle poetically sums up the Native American spiritual understanding of the position of humans within the framework of Nature. "La tero ne apartenas al la homo; la homo apartenas al la tero." It also eloquently pleads for ecological justice and wisdom. "Vi devos montri al la riveroj la tenerecon saman, kian vi montras al fratino via." This broadly metaphysical statement achieves a neutral ecumenical stance which is likely not offensive to any Native American elder. This speech does not merely refer to a wisdom tradition; it also expresses that wisdom simply enough so that the primitive European-schooled government officials can understand this holistic world-view despite their dogmatic Christian background.

The translation is quite good, with a consistent and appropriately clear style throughout. However, the typography is distracting, for all supersigns are inexpertly hand-drawn, while a few are missing. Even the u-breve (ü) is misrendered as u-grave (ù). This lack of attention to detail somewhat mars the appearance of this otherwise sweet little book.

Even more unfortunately, there

is no order nor reason to the illustrations, for they are drawn from many different nations from Sioux to Hopi to Algonquin in a swirl of feathers, horses and bison in the forested desert. Each of the line drawings is finely rendered with keen aesthetic sense, but rather few of the images reflect cultural artifacts of the Duwamish people of whom Seattle was Chief. There are even some miscellaneous drawings of Wild West cowboys and soldiers, including some famous Indian-killers, such as General Custer. The front cover drawing shows the Mt. Rushmore monument, which many Dakota Indians consider a desecration of a sacred mountain.

In summation, I would recommend this to those who read books, rather than to those who look at them.

A portion of the profits from the sale of this book go to the Suquamish Tribal Education Fund.

Luter Staranta Urso: **Mia indiana knabeco**. Tradukis William R. Harmon. Berkeley: Eldonejo Bero, 1995, 88p. ISBN 1-882251-09-1. Ĉe ELNA: kodo MIA002, prezoj \$6.95 (por nemembroj)/\$6.60 (ELNA-membroj)

Recenzis Reginald JADERSTROM

"Mi verkis ĉi tiun libron kun la espero ke la koroj de la blankhaŭtaj geknaboj kiuj legas ĉi tiujn paĝojn estos faritaj pli afablaj al la malgrandaj Indianaj geknaboj."

Tiel tekstas en dediĉo ŝajne infan-naiva pravigo pri la libreto. Sed tuj je la eklego, oni ja konstatas, ke la libro nepre ne estas infannaivaĵo.

Ĉefo Luter Staranta Urso (Luther Standing Bear) estis membro de la Siuoj (Sioux) aŭ Lakotoj (Lakota) de la nuna

nordcentra Usono. La nomon Sioux li klarigas kiel francan vorton signifantan "gorgotranĉulo". Li ne sciigas, ĉu tiu fremdlinga sinonimo estas insulto al la popolo; sed li ne malemas ĝin uzadi tra la libro. Same estas pri la vorto Indiano, kiun li konstante utiligas kiel ĝeneralan terminon por la nordamerikaj praindiĝenoj. La anglalingva originalo aperis en 1931. Se la ĉefo verkus en la '60aj jaroj aŭ poste, li eble elektus alternativajn vortojn.

En la infanaĝo la aŭtoro havis alinomon Ota K'te (Multaj Mortigoj). Ofte ni aŭdas pri tia alinomado ĉe neeŭropaj popoloj, pensante ĝin ekzotika kaj ne sufiĉe konstatante, ke la afero ne estas tiel diferenca de tiu ĉe ni. Alinomado - eĉ se mapli rita - ja okazadas ankaŭ inter blankaj usonanoj kaj aliaj de eŭropa deveno, farata ĉu de familianoj, ĉu de amikoj aŭ malamikoj. Tra la vivado de juna nordamerika indiĝeno kondukas nin la aŭtoro. Ni renkontas vortojn aŭ ne antaŭe lernitajn, aŭ sufiĉe maloftajn kaj tial jam forgesitajn: *lutro, kastoro, prociono, rubuso, saliko, siliko*. Kaj esperantigita *poneo* anstataŭ *ĉevalido* (klarigita de la tradukinte jam sur p.3). Helpe estus havi ne tre malproksime de la legoloko Esperanta-nacilingvan vortaron. Plue, ni enkondukiĝas en teknikaj detaloj de la indiĝenaj vivo kaj metilerto: elfaro de sagoj, ĉasado, fiŝkaptado, fel-konservado ktp. Certe informa por tiuj kiuj mem praktikas aŭ havas intereson pri tiuj aferoj.

La aŭtoro rememorigas al ni, ke la indiĝeno sentas unuigon kun la Naturo. "... la Indiano neniam estas kaprica detruanto de sovaĝa vivo kaj kreskaĵo. Li havas respekton por vivo kiun blankhaŭtulo ŝajne ne povas koncepti." (p.24)

Daŭrigo sur paĝo 13

Language in the News

News of the World Language Problem—Mark Lambert, contributing editor

In his new autobiography, *I Am Spock* (Hyperion Books, 1996), actor Leonard Nimoy shares a story about filming the movie *Marco Polo* in Beijing, China. Nimoy mentions that the film's director had hired a cab to take Nimoy to the Hotel Beijing. The cab driver spoke no English, and obviously did not comprehend the word "hotel"—so there they sat. The film's production crew was mostly Italian, and for the most part did not speak English either. After searching for an hour, Nimoy finally found one crew member who spoke English and Italian. This fellow then found one Chinese crew member who spoke Italian and Chinese. The fellow from China told the fellow from Italy how to say "hotel" in Chinese, the Italian then found Nimoy and told him, and then Nimoy was able to instruct the cab driver!

Omaha cable-tv company Cox Communications recently dropped the Satellite Communications for Learning (SCOLA) channel from its system. SCOLA provides foreign-language news programs from about 45 nations. Cox replaced SCOLA with a competing channel, The International Channel, which offers more variety than just news programs, but reportedly offers less language variety in its broadcasts. Cox Cable's decision drew criticism from foreign-language teachers and members of ethnic communities in the Omaha area.

A recent report from the U.S. government's General Accounting Office (GAO) criticized the Department of Defense's (DOD) language training. According to the GAO report, the DOD trains about 4,600 new linguists a year. In FY 92, it spent approximately \$78

million for language training. Languages are grouped into four categories, each representing the difficulty a native English speaker is expected to have in learning the language. Course lengths range from 25 weeks for allegedly less-difficult Category I languages (including French and Spanish) to 63 weeks for the most difficult category IV languages (including Arabic and Chinese). Language proficiency is graded using listening, reading and speaking skills according to standards developed by the Federal Interagency Language Roundtable and is ranked at six levels, from Level Zero (no practical ability) to Level Five (functional native ability). The goal at the end of training is a Level Two proficiency, defined as "sufficient language capability to meet routine social demands." The study said that, after the end of their language schooling, linguists' language proficiency declined about 25%. Of the various Dept. of Defense divisions, only the Army required a language-maintenance program.

Language learning via the World Wide Web continues to grow. Many of the home pages even allow you to hear native speakers of the language. Some recently reported Web Sites include: The Human Languages Page

<http://www.dcs.warwick.ac.uk/~bear/Language-Page.html>
This web site offers links to other language web-sites around the world.

Foreign Language Resources
<http://www.itp.berkeley.edu/~thorne/HumanResources.html>
The web site also offers links to other language-education pages.

The European Union (EU) has

established a new trademark registration system. The new system will protect trademarks in all 15 EU nations. Language considerations have of course become an issue. EU trademark applications may be filed in any of the five EU "working languages" (English, French, German, Italian and Spanish), or any of the other six "official languages" (Danish, Dutch, Finnish, Greek, Portuguese and Swedish). The applicant must also designate a second language from one of the working languages. When a trademark dispute arises, the challenger must file papers in one of the two languages designated by the applicant; all further proceedings will take place in that language. The Legal Times reports that international intellectual property lawyers have already devised strategies to assure that proceedings will take place in a language less favorable to any likely challengers.

Talk Isn't Cheap Department: Feeling like they were not being compensated for the language skills they use on the job every day, U.S. Customs inspectors in Miami, Florida, recently threatened to stop speaking Spanish and other languages unless the Treasury Department increased their salary by five percent.

Send clippings or synopses of "News of the World Language Problem" to the ELNA CO or to columnist

Mark Lambert
3501 University Ave.
Des Moines, IA 50311-2305
email: 2080361@mcimail.com.

Language Barriers to Third World Progress

by Andrei KOLGANOV and Kent JONES

Introduction

The third world is characterized by unpleasant living conditions, poverty, congestion, poor sanitation, low standards of health and high illiteracy. Less apparent is the fact that most of the more than 3000 languages of the world are found in the Third World, where they exacerbate the difficulties.

Diversity of language use is not in itself a problem. Rather, it is the resulting reciprocal non-comprehension which is the problem, because it creates a multiplicity of separate ethnic groups. The communicative isolation of these groups maintains their ignorance about each other. It also makes cooperation in activities such as commerce and civic projects more difficult. This keeps a brake on economic and social progress.

Reciprocal ignorance provides a breeding ground for hate and its offspring, violence. In Africa the colonial powers imposed their arbitrary borders, cutting through some ethnic groups while forcibly enclosing two or more incompatible groups. With the departure of the colonial powers the various ethnic groups became free to fight each other within the inherited borders. Many have chosen this option. This language-based threat to stability is now thought to be one of the greatest dangers to the post-cold-war world.

Impedance to education in the Third World

Those few who are lucky enough to go to school may start life with the family language, begin

school with a local language, and finish with a regional language. A more difficult framework for learning would be hard to find.

Yet another language may be needed if a student aspires to a career in science or technology. The full range of instructional and reference material can be found in only five languages. They are English, French, German, Japanese and Russian.

It is a practical impossibility for young people from ordinary families to succeed in learning one of these languages. Years of study are required. Money is needed for books and language teachers. Much time is needed to master such languages because they are all filled with complications and irregularities. English, for example, is so difficult that after 6 years of study under the best of conditions Japanese students cannot speak it.

Science education is made nearly impossible by this language barrier. The resulting lack of scientifically trained personnel is at least partially responsible for the absence of the infrastructure of civilization in the Third World. Even if outside forces were to design and construct water, sewage and electrical systems, the inability of local labor to operate and maintain them renders the effort futile. Human accomplishment in general is frustrated by language confusion. In this instance it is in the area of scientific education for Third World youth.

Multilingual Organizations

The United Nations and its subdivisions use languages dictated by their most powerful members.

These are never Third World countries. Hence a precondition for communication is that the weaker party, the Third World, use the language of the stronger. More than \$100 million per year is spent on translations between the 6 dominant languages. Were it not for the language problem, this money could be channelled to useful projects such as health in the Third World.

The European Union is a regional organization which uses eleven languages. This may increase if Turkey, Hungary, Poland, the Baltic states, etc. become members. At least a fourth of its budget is spent on translations, because any document produced in one language must be provided in all others. Again, this is money which could alternatively be used for helping the Third World.

Individual countries are also multilingual. These include the former Soviet Union, India and China. Some of the ethnic languages in these countries are given official status, but many are not. India has over 200 language minorities, but only 14 of these are used on the money. Hindi is being pushed to become a language of choice along with English, but this produces resistance from the peoples of southern India. In the Peoples Republic of China, Mandarin (a northern dialect of Chinese) is imposed on Uigurs, Tibetans, Mongols, and others. The former Soviet Union is yet another example where Russian was proclaimed and often functioned as a language of "international communication" (yazyk mezhnatsionalnogo obshcheniya). This situation generates not only

confusion but inter-ethnic hostility.

Common language for Central Asia

The case of post-Soviet Central Asia is an example. This huge region, also known as Turkestan, had been incorporated into Russian Empire in the second half of 19th century. The three political entities which were there at that time were: Kokand Khanate, Bukhara Emirate, and Khiva Khanate. These political formations were based neither on ethnic nor linguistic principles. The population of Bukhara Emirate consisted of Turkic-speaking Sarts, Persian-speaking Tojiks, etc. The identity of a people was often related to the nomadic or sedentary way of life. The majority of people throughout Turkestan spoke some variety of Turkic dialect. At the same time there existed a literary version of the language known as Chagatai or Old Uzbek common to educated people. Many were bilingual (Chagatai-Persian), because the Persian language was a language of state and office work in, e.g. Bukhara.

In 1920 after Central Asia had been "inherited" by Soviet Union, the new authorities carried out a so-called delimitation of national borders. In the foundation of five new states - Kazakhstan, Uzbekistan, Kirgizstan, Tajikistan, Turkmenista - an "ethnic and linguistic" principle was established. Even now some scholars argue that the creation of those states was at least in part artificial. However the imposition of national borders contributed to splitting the groups. In this case about seventy years was enough for groups actually to take on new identities.

New nations emerged in a region where identity was usually based on territorial origin / affiliation (e.g. Tashkentli or that who reside in Tashkent). That sometimes damaged tribal backgrounds. Thus two parts of the same nomadic tribe

which found themselves divided between republics of Kazakhstan and Kirgizstan accepted different "nationalities", while Tajiks in Samarkand sometimes found it necessary to write in their passports that they were Uzbeks, because that provided for a better career advancement.

The effort to find a common language has turned to Russian in the past decades. It was hailed as a language of inter-ethnic communication. All governmental documentation was written in Russian, gradually it became a language of choice for urban national elites to the degree of their actually losing their native language. The situation completely changed with the collapse of the Soviet Union. The languages of titular nations were proclaimed official in each respective state of Central Asia. For the time being, Russian is still performing the role of a bridge language. But more recently Turkish has been actively advanced by Turkey. Iran is increasing its influence in Persian-speaking Tajikistan. Further, there has been contention over the choice of Latin or Cyrillic alphabet in many republics. Turkmenistan and Uzbekistan are changing the writing system to Latin, Tajikistan to Arabic. With the growing economic presence of western powers English is becoming more and more popular, especially with upwardly mobile urban youths. But English would not be usable in the rural regions because there is no educational structure to support it.

Proposed Solutions

Proposals have taken three forms, namely, authoritarian, democratic, and rational. The authoritarian proposal would use one national language, such as English, as the common language. While this would be attractive for the current speakers of the chosen language, others simply would refuse to accept its primacy. The

United Nations still refuses to confine itself to any single national language. In Korea, Japanese was mandatory for 35 years while Korean was forbidden. With liberation in 1945 Japanese was quickly thrown out.

The democratic path is followed at the European Union. The language of each member is regarded as an equal to all others. Anything said in one language must appear in all others. The result probably makes the bricks of the old Tower of Babel smile at the confusion. Not only is it costly but it is operationally faulty. Where does one find an adequate supply of translators between the many language combinations, such as Greek and Danish?

The rational proposal for language is the only practical choice. Its principle is similar to that of the metric system of measurement. It would use a logically devised language which would therefore be simple to learn. Having been originated by deliberate design, it would be independent of any government. The name of the only such language is Esperanto.

Both authors have spoken this language for several years. They have used it in communication with persons of dozens of countries. They have witnessed the summer credit courses at San Francisco State University and the University of Hartford, Connecticut. This accounts for their certainty that Esperanto can serve the people of the Third World well as their common second language.

Scientific and technical education must await the development of textbooks in Esperanto. When they become available, young people can teach themselves this language within only six months. The reason that this is true is that its grammar is perfectly regular. A chemistry text, *Generala, Organika kaj Biologia Kemio*, is an example of the textbooks ultimately needed. This

initiative for scientific textbooks comes from an Iranian, Dr. M. H. Saheb-Zameni.

As the Esperanto language is more and more used, the barriers to Third World progress will markedly diminish.

Recenzo, daŭrigo de paĝo 9

Sed eble diversaj nuntempaj hom- kaj natur- amantoj sentas sin maltrankvilaj pri ordinaraj praktikoj de la Indianoj: batalado inter la Siuoj kaj Pawnee (p.61); ĉasado/buĉado de bestoj. La lasta ĉapitro, "Finfine mi mortigas bizonon", fiere kaj detale priskribas la ĉason kaj rezulton en maniero kiu fascinus kaj kontentigus fusil-amantan dekstrulon pli ol humanisman verdulon. Aliloke (p.39) ni sciiĝas pri la diversaj utiligebloj de bizona stomako.

Vegetaranoj kontentiĝos, informiĝinte pri la manĝeblaj (foje medikamentaj) plantoj. Sed ĉu vi scias, ke tabako "forigas malsanon kaj purigas la aeron" (p.36)? Poste estas trankviligeta klarigo, ke por medikamento, tabako estis uzata "plenforte", sed por fumado oni eltrovis metodon "plimalfortigi ĝin". (p.38) La tradukinto estas William R. Harmon, ĉefdelegito de UEA en Usono, ofta vojaĝanto, kaj ĉiama gastiganto de vizitantoj al la Sanfranciska regiono. La Esperanta stilo iom spegulas tiun de la '30aj jaroj, kiam aperis la originalo. Laŭ komunikado de la eldoninto (Ionel Onet), la angla lingvo en tiu originalo estas ofte netipa. Tio, ni rajtas supoziti, rezultas el la dulingveco de la aŭtoro. Ĉu ties dulingveco kreis unikajn stilajn kapablojn, same kiel okazis ĉe Joseph Conrad, Rudyard Kipling, Pearl S. Buck k.a.? Jen tasko por komparemuloj, kiuj eventuale disponas la originalon.

Sed eĉ sen la originalo, jen libro informas kaj ĝinda - eĉ por homoj sufiĉe kleraj pri la Lakotoj kaj aliaj amerikaj indiĝenoj.

2a JES: Duono da partoprenantoj. . . duoblo da amuzo

Verkis Joseph TRUONG

Filadelfio—Jam la unua tago de la renkontiĝo prezentis surprizan frenezaĵon... kelkajn centimetrojn da neĝo! Malgraŭ tio, tre fervora, babilema kaj sufiĉe freneza grupo mem da junuloj kuraĝe vojaĝis al monaĥinejo en norda Philadelphia (Filadelfio) por ĉeesti la 2an Junularan Esperantistan Semajnfinojn, organizitan de la Usona Esperantista Junularo de la 8a ĝis la 10a de marto, 1996.

La nombro de partoprenantoj de la 2a JES estis iom malpli ol duono de la 22-kapa JES pasintjare, sed ĉio cetera ja multe kreskis ekde 1995—la lingvoscio de la partoprenantoj (aparte laŭdinda nivelo de Esperanto, kaj eĉ neniam da krokodilado), la kvalito de la konferencejo mem (monaĥinejo kiu ofertis unuopajn ĉambrojn, multege (eĉ tro??) da bonegaj manĝaĵoj, kaj pli ol sufiĉe da kunvenspaco), kaj, laŭ la diraĵoj de la partoprenantoj, la amuzo kaj la intereso de la unika sperto.

La frenezeco daŭris la tutan semajnfinojn, danke al kelkaj sufiĉe strangaj ludoj, kiel la balona rompadado (en kiu ĉiu partoprenanto pendigis sur la dorso balonon kaj ricevis novaĵpaperan batilon. Tiam ĉiu kuris kaj klopodis frapadi la balonojn sur la aliaj personoj. Mi neniam imagis, ke ni Esperantistoj povus esti tiel perfortemaj, (ĉar mia korpo ankoraŭ multe doloras), ronda tablotenisado (ĉu eblas ludi tablotenisadon dum kuri ĉirkaŭ la tablo?) kaj eĉ flugpilkado per balonoj—en la kunvenĉambro mem (unu el la balonoj eĉ enhavis iom da akvo... kaj rompiĝis sur min kiam mi frapis ĝin.)

Estis ankaŭ iom da tempo por seriozaj diskutoj, kiel tiu pri kiel ni junaj Esperantistoj povas plibonigi la mondon. Ni povis kompili sufiĉe interesan, malgrandan liston de ideoj kiu ja helpos USEJn en ĝia

socia agado. Unu partoprenanto eĉ faris kurtan liston da kvar tre gravaj kaj pensigaj ideoj pri Esperanto kaj socia agado. (Persone, inter la plej memorinda por mi estis, ke "Esperanto estas ilo, ne celo".) La listo, kun aliaj interesaj faktoj pri la volontado, haveblas senpage de mi.

Bonŝance, la partoprenantoj ne nur babilumis pri kiel helpi, sed vere helpis mem. Ni sendis al kelkaj lokaj grupoj eksterlandaj pakafetojn da gazetoj kiel malgrandajn donacojn, kaj eĉ subskribis aliajn leterojn por danki kaj saluti personojn. La tutan semajnfinojn ĉiuj tre volonte kaj ĝentile helpis alian partoprenanton, iom pli aĝan kaj tute blindan. Ŝi poste diris al mi, ke ŝi miris, ke ŝi eĉ ne bezonis peti helpon de iu, ĉar ĉiuj jam proponis helpon.

Kvankam la programo ĉe la monaĥinejo finiĝis je la 10a atm. dimanĉon, la amuzo fakte daŭris dum mi helpis la partoprenantojn atingi la bushaltejon kaj stacidomon en Filadelfio. Post vigla kaj laŭta tagmanĝo (en unu flanko de la tablo okazis tre verva diskuto pri kapitalismo, en alia la estrarkunveno de USEJ), ni piedmarŝis longtempe (ja kelkajn horojn, por ekzerci post tiom da manĝado) tra la bela urbego, dum kiam ni faris multe da unikaj fotoj, vidis historie gravajn lokojn de Usono, kaj eĉ iom surdiĝis (pro la eksplodantaj piroteknikaĵoj dum la azia novjara ceremonio de la draka danco, kiun ni bonŝance malkovris hazarde en la ĉina kvartalo).

Do, ek' suden, junuloj, al Washington DC, kie plej verŝajne la venonta JES okazos... faru planojn por kunfesti la 5an datrevenon de USEJ tie! Se pro iu stranga kialo vi maltrafos la okazon, certe vojaĝu tien en j. 2000, kie (espereble) okazos la 56a Internacia Junulara Kongreso!

Summer Esperanto Activities

Three important Esperanto activities have gotten less publicity this year than they should have, due to the absence of *EsperantoUSA*.

It is probably too late to arrange to attend the classes offered by the San Francisco State University. But I hope you will receive this in time for the other two:

Hartford

July 7-13 at the University of Hartford in Hartford, CT, you can take introductory, intermediate, or

advanced classes in Esperanto.

Instructors:

- Joseph F. Conroy, author of *Beginner's Esperanto*, chair of high school foreign language department.
- Spomenka Stimec, Croatia; author, lecturer, co-winner of 1994 FAME prize for contributions to Esperanto culture.

Other speakers will include Dr. Humphrey Tonkin (President of the University.)

Contact: Ms. Hilda Grossman,

Office of Summer Programs, University of Hartford, 200 Bloomfield Avenue, West Hartford, CT 06117. (800) 234-4412 or (860) 768-4401.

Detroit '96: la 44a

Jarkongreso de ELNA

July 13-15 at the Fairlane Holiday Inn in Detroit, MI, you can attend this year's annual congress. This year's theme is "Esperanto in everyday life."

Contact the Central Office.

3a Amerika Kongreso

verkis Atilio ORELLANA ROJAS

Kun 16-jara breĉo inter la antaŭa kaj la ĉijara evento, tre sukcese realiĝis en la kostarika ĉefurbo San José la 3a Amerika Kongreso de Esperanto kun la partopreno de 50 esperantistoj el 17 landoj. El la amerika kontinento mem estis reprezentitaj 11 landoj, kelkaj el ili neniam antaŭ reprezentitaj en internaciaj aranĝoj kiel Nikaragvo kaj Panamio.

La Kongreso kalkulis je la efika apogo de diversaj amas-komunikiloj, kiuj vaste informis pri la evento antaŭ ties okazigo kaj dum ĝi. Indas je mencio, ke eĉ *El Mercurio*, la plej vaste legata ĵurnalo el Ĉilio, montris intereson pri nia evento kaj kontaktis nin dum la Kongresa semajno por informado en Ĉilio.

La Kongreso estis malfermita en la teatro "1887," nomo kiu forte ligiĝas al nia Esperanto-historio (tamen, ne pro tio ĝi havas tian nomon, sed simple pro tio, ke la domo estis en tiu jaro konstruita!). Ĉeestis la Ministro pri Edukado kaj diversaj altrangaj reprezentantoj de la Universitato de Kostariko, kio evidentiĝas la grandan interson de la edukaj kaj klerigaj instancoj en Kostariko pri nia afero.

Niaj sesioj efektiviĝis en la

Belletra Fakultato kaj la programo disvolviĝis surbaze de 3 ĉefaj aktoj: la kunsidoj pri Amerika Agado, Instruado, kaj Turismado.

Rilate la laboron en la kontinento estis ĉefe diskutataj la situacio de la junularo kaj ties organiza strukturo, la stato de la instruado kaj edukado al estontaj instruistoj, okazis prezentado de diversaj lernolibroj uzataj en la hispanlingva parto kaj en la angloparolanta regiono de la kontinento. Certe la plej fekundaj kunsidoj estis tiuj dediĉitaj al regiona agado kaj interrilatoj inter landoj: tiam naskiĝis pluraj projektoj kaj firmiĝis aliaj ekzemple:

- Starigo de Amerika Revuo per la interreto. La Universitato de Kostariko disponigis al ni spacon por tiu projekto kaj de aprilo ĉijare ĝi funkcios kiel forumo por ligi amerikanojn.
- Daŭrigo de kunlaboro en la projekto pri televida kurso, kiun partoprenas Usono, Meksiko, kaj Venezuelo.
- Ĉiuj landaj asocioj en la kontinento estis petataj nomi ene de ties estraro respondeculon, kiu zorgu pri la interrilatoj amerikaj kaj tiu

eniru la komisionon pri Amerika Agado nome de la lando, kiun reprezentas.

- Plifortigo de la UEA-Fondaĵo, kiu prizorgas la kontinenton.
- Instigo al landaj asocioj en la regiono de Sudameriko pli profunde esplori la eblojn eniri tiun instancon por informi pri lingvoproblemo.

Cetero de la programo konsistis el brila nacia vespero, kiam ni konatiĝis kun dancoj kostarikaj; internacia vespero kaj koncerto de Teresita ALANIZ. Indas je mencio la altnivela kunlaboro de Prof. Luis Jorge SANTOS MORALES el Kolombio, kiu prelegis pri "Kiel kaj kial plialtigi la memestimon" kaj "Kiel fariĝi sukcesa instruisto" kaj Félix GARCIA BLAZQUEZ el Venezuelo kiu prelegis pri gramatiko.

En la instrua parto estis prezentado de Mazi-filmo, efektiviĝis ILEI-Ekzamensio kun ses ĉeestantoj, el kiuj kvin sukcesis (unu en elementa kaj kvar en meza) kaj A-Seminario pri Cseh-metodo. Ĉiujn tiujn programerojn gvidis Atilio ORELLANA ROJAS.

La 4a Amerika Kongreso efektiviĝos en Bogoto (Kolombio) en 1996.

Esperanto League for North America **National Talent Bank**

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 Fax: (510) 653-1468 elna@netcom.com

Please type or print clearly.

Name: _____
Address: _____
City, state, zip: _____
Home phone: () _____ Work phone: () _____
Fax: () _____
E-mail address: _____

Current/previous profession/work experience: _____
Hobbies and other talents and abilities: _____

Language abilities (please list the languages you can read and write and your approximate fluency, 1=poor to 5=high):

What topics or areas would you most like to work on:

par
Do you have a network of people who share the same interests and talents? _____

Do you have a personal computer? [] Yes [] No ... If yes, type(s): _____
Do you have a laser printer? [] Yes [] No ... If yes, resolution: _____
Do you have access to e-mail? [] Yes [] No
...to Usenet newsgroups? [] Yes [] No
...to the World Wide Web? [] Yes [] No

Do you have experience in:

- [] writing articles [] typing [] fundraising
[] public speaking [] home pages/HTML [] public relations
[] organizing [] graphics/fine arts [] legal counsel
[] special events [] sales
[] marketing [] bookkeeping

Level of commitment:

- [] 4 hours per week or more (200 hours per year)
[] 1-2 hours per week (50-100 hours per year)
[] 1-2 hours per month (12-24 hours per year)
[] 5-10 hours per year

Notes and comments (use other side or more paper if desired):

Vojaĝoj en Esperantujon - de la Familio Bonvolo

Jam dum multaj jaroj ELNA planis fari Esperanto-instrukuron per televido. Lastatempe la planado firmiĝas, la teksto estis verkita, reverkita, rereverkita kaj polurita; kaj ni nun pretas (krom financo) antaŭenigi la projekton.

La instrukursaro, nomita Esperanto, Pasporto Al La Tuta Mondo, celas studentojn ĉe gimnazioj kaj universitatoj, kaj dissendon per eduka aŭ komerca televido. Ĝi konsistas el 15 lecionoj de po 30 minutoj. Ĝi uzas la "rektan metodon" de instruado. La lecionoj havas la formaton de televida felieton-komediario en kiuj ĉefaj kaj malĉefaj rolantoj aperas, malaperas kaj reaperas je diversaj momentoj, interagante en amuzaj sociaj situacioj.

La ĉefaj rolantoj (vidu la artaĵon) estas la ses anoj de Familio Bonvolo: Georgo, Greka filozofa; Filiso, klasika baletistino; Roberto, profesia longdistanca kuristo; Jolando, hipodroma ĵokeo; Heleno, avangardskola skulptistino; kaj Donald, adoleskaĝa sed geniula Britmoda juĝisto. La familianoj surportas nekutimajn kostumojn, kaj kondutas en originalaj manieroj, ĉar ili ne estas ordinaraj homoj. La Familio Bonvolo estas ekstertempaj simboloj de la tuta homaro. Tiel la kursoj malfacile eksmodiĝos.



Krom la uzo de la rekta metodo, la lecionaro estas strukturita sur kelkaj aliaj gravaj instrumentoj, kiaj dialogaj subtitoloj, formulfrazoj, vortokatalogoj, fotoĵoj, mapoj, desegnaĵoj, kaj komputorestigitaj lumefikoj. La video estos farita ciferece, ke ĝi poste estu adaptebla al codoromo kaj interagada instruado. Laborkajeroj estas planataj en diversaj naciaj lingvoj, komence la Angla, Hispana, kaj Franca.

La teamo de kunordigintoj, verkistoj, aktoroj, direktoroj, kostumistoj, desegnistoj, kinematografiaj teknikistoj kaj aliaj partoprenintoj, jam kunlaboris kaj ĵus finis "reklam-videon" 10-minutan, kiu prezentas la projekton kaj celas la kolektadon de mono por nia aŭdaca projekto.

La Familio Bonvolo komencos sian vojaĝon en San Francisco, iros al Detroit por montrado dum la ELNA-kongreso 13-15 julio, poste al Prago. La video montriĝos dum la Universala Kongreso de Esperanto almenaŭ dufoje; dum publika kunveno, kaj dum la Tago de la Lernejo. Poste, la video iros al Tabor por montrado al la instruistoj ĉe la ILEI-kongreso, kaj post tio al Berlino por montrado dum la IJK.

La vojaĝon de la reklamvideo planas kaj efektivas Esperanto Vojaĝ-Servo, kiu cetere aranĝis interesan post-UK-ekskurson al Rumanio en 1996, kaj ekanranĝas ekskurson post la UK en Adelajdo kiu okazos 19-26 julio 1997.

LA FAMILIO BONVOLO PETAS: UZU ESPERANTO VOJAĜSERVON POR VIAJ ESPERANTO-VOJAĜOJ!

Esperanto Vojaĝ-Servo • 6104 La Salle Avenue • Oakland CA 94611
☛ [510] 339-2001 • Fax [510] 339-6317 • wrharmon@aol.com

Esperanto League for North America
P.O. Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org.
U.S. Postage
PAID
Permit #1040
Leesburg, FL 34748